sub la suda kruco ★

ESPERANTO



You are cordially invited to attend the inauguration of the exhibition:

11th September - 2nd December 2011

★

ESPERANTO: PROMOTING EVERYONE'S LANGUAGE

South Australian Migration Museum
82 Kintore Avenue, Adelaide SA
Sunday 11th September at 3 p.m.
To be opened by Professor Ghil'ad Zuckermann, University of Adelaide.

Arranged and curated by Esperanto in South Australia

Supported by:

MIGRATION MUSEUM

Government of South Australia

PARALLAX



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 19 [4] numero 108 decembro 2011

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
Redaktoroj: Šandor Monostori, Kam Lee, kaj David Ryan
Kontaktadreso | esk2@esperanto.org.au

P.O. Box 1097
Bendigo Central Vic 3552
Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto Sub la Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEA | www.esperanto.org.nz – exec@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia oficiala kontaktadreso, "esk2@esperanto.org.au".

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15 de februaro 2012

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright @ 2011 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj.

Sur la kovrilo: Dum la malfermo de la Esperanto-ekspozicio ĉe la Migra Muzeo de Sudaŭstralio. Uzo de la foto permesita de la Migra Muzeo de Sudaŭstralio.


5 Mia sonorilo ne funkcias


7 **Ĉu moderna teknologio plibonigas nian vivon?**


9 **Vizito al Tasmanio**


11 **..HIERAŬ**


15 **Centjara Fotaĵo**


19 **George Collingridge**


22 **Ideoj por la venontaj 100 jaroj**


23 **Esperanta Ekspozicio**


27 **Vizito al Kakatua-Insulo**

decembro du mil dekunu

Antaŭparolo

Vi tenas en viaj manoj la unuan numeron de ESK pri kiu respondecas novaj kunredaktoroj: Kam Lee el Tasmanio kaj David Ryan el Nov-Zelando. David respondecos pri la enhavo de ESK, kaj Kam respondecos pri la aspekto kaj formato. Ni certe garantias al vi ke ESK daŭre estos same altkvalita eldono kiel antaŭe.

Tamen, ESK dependas de vi! Ni aperigos artikolojn nur se vi verkos ilin. Maldika numero de ESK volas diri ke nia legantaro ne kontribuis. ESK estas *nia* gazeto kaj ni kuraĝigas ĉiujn sendi kontribuojn en Esperanto aŭ en la angla pri Esperanto.

Ni dankas al Chris Krageloh kiu kunredaktis ESK dum multaj jaroj sed, pro laboraj kialoj, Chris ne plu havas tempon por la redakta tasko. Feliĉe, Ŝandor Monostori daŭre kunredaktos ĉiun duan numeron de ESK.

Kiam mi skribas ĉi tiun antaŭparolon, Nov-Zelando ĝojas pro la fino de la internacia turniro de rugbeo en kiu partoprenis 20 landoj. En la stratoj de grandaj kaj malgrandaj urboj en Nov-Zelando, oni vidis amason da flagoj kaj vizitantoj kun nacia(j) koloro(j) survizaĝe, kaj oni aŭdis etnan muzikon de foraj landoj. Kvankam temas pri sporta evento, por eta lando kiel Nov-Zelando la turniro estis kiel tutlanda festo al kiu ni invitis vizitantojn el la tuta mondo. En la angla lingvo oni ofte uzas la vorton ‘esperanto’ por esprimi universalecon. Dum septembro/oktobro de 2011 rugbeo estis la Esperanto de la sporta mondo kiu kunigis personojn de diversaj rasoj, lingvoj, religioj ktp.

Nun, iomete pri viaj novaj kunredaktoroj:

Mi (Kam) nuntempe loĝas en Hobarto kaj kelkaj el miaj ŝatokupoj estas verkado de Esperantaj kantoj, verkado de artikoloj por ESK, renovigado de la AEA-interretejo, iom da administra agado por AEA, kaj nun iom da redaktado por ESK. Oni povas konkludi ke mi multe interesiĝas pri Esperanto, ĉu ne? Certe la estonteco de ESK estas ekscitiga!

Mi (David) loĝas en Wellington kun mia edzino kaj 9-jaraj ĝemelinoj. Mi Esperantistiĝis antaŭ 30 jaroj kaj mi estas nun Prezidanto de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio. Mi ege ŝatas vojaĝi kaj renkonti eksterlandajn Esperantistojn.

Finfine, ni antaŭĝojas vidi vin en Rotorua por la kongreso de NZEA en januaro.

David Ryan

Bildo: *Miloj da Wellingtonanoj (onidire la duono de la tuta loĝantaro) festas surstrate je la fino de la internacia rugbea turniro.*



Mia sonorilo ne funkcias

Rakonto de anonima kontribuintino

Post la ploriga fino de rilato kun mia eksa amato, mi iris ekloĝi en domo kies sonorilo ĉe la ĉefpordo ne funkciis. Mi ne scias kial – eble pro eniro de pluva akvo en la elektran aparaton. Mi estas certa ke ĝi funkciis kiam mi ekloĝis tie, sed ĝi ŝajne ĉesis funkcii post mia alveno. Mi ofte pensis ke tiu sonorilo similas al mia vivo. Post la fino de mia amrilato, mi timis amon kaj mi vere ne volis kontakton kun aliaj personoj. Ŝajne, kiam venis personoj al mia domo, ili uzis la sonorilon sed ili ne sciis ke ĝi ne sonas en la domo. Eble ili frapis la pordon, sed mi ne aŭdis ĉar mi aŭskultis muzikon aŭ mi estis en la ĝardeno malantaŭ la domo. Tio ne maltrankviligis min – mi bezonis tempon por esti sola.

Iun someran semajnfinon mi laboris en la eta ĝardeno antaŭ la domo. Estis varma tago kaj mi estis ĝoja. Subite mi aŭdis voĉon malantaŭ mi. “Saluton, ĉu mi ĝenas vin?”, diris vira voĉo. Mi subite vidis belan junan viron, verŝajne de la sama aĝo kiel mi. ‘Mi estas Rikardo. Mi faras enketojn por televida kompanio kaj mi volas fari al vi demandojn pri la programoj kiujn vi vidas. Ĉu mi rajtas? La demandaro estas sufiĉe longa kaj eble ni bezonos 30 minutojn.’ Mi ne scias kio okazis al mi, sed mi respondis: ‘Jes, kun granda plezuro’.

Rikardo kaj mi eniris la domon kaj ni sidiĝis ĉe tablo. Rikardo faris al mi multajn demandojn: ‘Dum kiom da horoj vi rigardas la televidon ĉiutage?’ ‘Kiujn programojn vi vidas?’ ‘Ĉu vi memoras reklamojn pri novaj aŭtomobiloj?’ ktp. Dum li faris tiujn demandojn mi rigardis liajn belajn bluajn okulojn kaj mi eble respondis ‘jes’ aŭ ‘ne’, sed mi jam forgesis. Televidaj programoj ne interesis min, sed Rikardo jes.

Je la fino de tiu demandado li diris al mi: ‘Nun mi devas lasi ĉe vi ĉi tiujn enketilojn kaj dum la venonta semajno mi petas ke vi skribu kiujn programojn vi vidos. Post unu semajno mi revenos por ke vi redonu al mi viajn paperojn’.

Rikardo ekstaris kaj lasis mian domon. Mi vidis lin iri al la domo de mia najbaro, supozeble por fari tie la samajn demandojn. Dum la sekva semajno mi diligente skribis la programojn kiujn mi rigardis kaj ĉiufoje kiam mi faris tion mi pensis pri Rikardo. Li vere plaĉis al mi. Por la unua fojo ekde multa tempo mi kredis ke mi eble estas preta por

denove ami viron.

La sekva sabato estis pluva tago kaj mi restis hejme aŭskultante muzikon, senpacience atendante la alvenon de Rikardo. Mi ege deziris revidi lin. Mi atendis, mi atendis, mi komencis legi libron sed mi ne sukcesis, mi atendis, mi atendis, mi komencis skribi retmesaĝon al eksterlanda esperantista amiko, sed mi eĉ ne povis pensi en Esperanto.

Kaj tiam terurega penso frapis min: mia sonorilo ne funkcias! Se venas Rikardo, li uzos la sonorilon sed li ne scios ke ĝi ne funkcias. Li eble pensos ke mi ne estas hejme kaj li foriros!

Kaj tiam okazis io ege stranga. Sonis la sonorilo! Mi ne kredis tion. Mi staris senmove. Kaj tiam denove sonis la sonorilo. Tutrapide mi kuris al la pordo de mia domo, mi malfermis la pordon preskaŭ forĵetante ĝin, kaj tie mi vidis mian belan Rikardon! Mi preskaŭ volis kisi lin. Freneze, mi tuŝis la sonorilon. Ĝi sonis. Mi denove faris tion. Ĝi denove sonis. Mirakle! Rikardo rigardis min kiel frenezulon. Mi nur pensis kiel strange, sed bonŝance hodiaŭ funkcias mia sonorilo.

Nu, por mallongigi ĉi tiun rakonton, mi nur diros ke mi diris al Rikardo ke mi trovas lin afabla kaj li respondis same. Ni enamiĝis kaj, post nelonga tempo, Rikardo proponis ke ni loĝu kune. Pro la fakto ke lia domo estis for de la urbcentro, ni decidis loĝi kune en mia domo. Do, iun varman sabatan tagon, mi aŭdis la dolĉan sonon de la sonorilo. Tie staris Rikardo kun granda amaso da skatoloj kaj valizoj, preta por la komenco de nia kuna vivo.

Kelkajn semajnojn poste, mi ricevis telefonvokon de mia patrino. Ŝi riproĉis min: ‘Ĉi-matene mi venis al via domo por kafumi kun vi kaj Rikardo. Mi uzis la sonorilon sed neniu venis al la pordo. Ĉu vi ankoraŭ dormis?’ Mi pensis ‘kiel strange, mi certas ke la sonorilo funkcias’. Mi iris al la pordo kaj tuŝis la sonorilon. Strange, ĝi ne plu funkciis. Ho ve, mi devos telefonvoki al ripariston. Tamen, mi tiam pensis ke, kiel antaŭe, la sonorilo estas kiel simbolo de mia vivo. Mi nun estas ege ĝoja kun Rikardo. Mi deziras neniun alian. Mi volas esti sola denove – sed kun Rikardo. Mi ne venigis ripariston. Mi ne plu bezonas sonorilon ĉe la pordo.



Ĉu moderna teknologio plibonigas nian vivon?

Ĉi tiu artikolo baziĝas sur konversacio dum kunveno de la Esperanto-Rondo de Wellington.

En nia hodiaŭa vivo ni ĉiutage uzas novan teknologion, ekzemple retmesaĝojn, Skajpon, Interreton, poŝtelefonojn ktp. Tamen, ĉu tiu nova teknologio estas avantaĝo aŭ malavantaĝo?

Kelkaj teknologiaj aĵoj sendube faciligas nian vivon. Imagu ke vi iras laŭ kampara strateto en aŭtomobilo kiu subite ĉesas funkcii. Vi povas tuj uzi poŝtelefonon por voki al iu por peti helpon. Vi ankaŭ povas voki por informi vian amat(in)on ke vi ne alvenos je la atendata horo. Kion oni faris antaŭ 20 jaroj? Oni devis serĉi publikan telefonon kaj, por fari vokon, oni bezonis monerojn! Nun, certe, poŝtelefono havas avantaĝojn. Tamen, uzo de poŝtelefono prezentas malavantaĝojn. Ekzemple, oni aŭdas pri lernejanoj kiuj sendas minacajn mesaĝojn al samklasanoj kiuj, rezulte, ege timas. Oni aŭdas ankaŭ pri junulo kiu sendas mesaĝon al amatino por diri ke li ne plu volas havi rilaton kun ŝi (junulinoj faras same). Tiukaze, ricevi tian novaĵon per mesaĝo ne estas tre ĝoja afero. Kiel okazis antaŭnelonge en Britio, simpla retmesaĝo 'Venu ŝtelpreni el butikoj en urbcentro je la 10a' sendita al miloj da personoj ankaŭ povas okazigi ĥaoson.

La Interreto certe havas grandan influon sur nia vivo. Per retmesaĝo iu en Nov-Zelando povas sendi ĉi tiun artikolon tuj al redaktoro en Aŭstralio. Oni ŝparas tempon kaj sendkoston. Tamen, male, sendi retmesaĝon per Interreto estas tro 'facile'. Firmao povas sendi mallongan mesaĝon al iu kiu petas postenon: 'Ni ricevis vian peton. Malfeliĉe, vi ne sukcesis'. Tiu ne estas ĝentila mesaĝo, ĉu?


La Interreto helpas nin informiĝi pri diversaj aferoj. Oni povas viziti multajn retpaĝojn por scii kio okazas eĉ en ĉi tiu momento en nia mondo, ne kio okazis je la 3-a de la mateno kiam oni eldonis la tagĵurnalon. Tio havas avantaĝojn. Tamen, ĉu ne estas tro da novaĵoj? Ĉu ne nun estas tiom da akuzoj, skandaloj, kaj bagatelaĵoj? Antaŭe almenaŭ oni sentis ke la televida novaĵprogramo aŭ tagĵurnalo estas utila kaj informriĉa. Nun oni devas zorge atenti pri la vero. Por fari hejmtaskon, Interretaj paĝoj estas utilaj por lernejanoj. Paĝo en Vikipedio povas rapide doni faktojn pri persono, lando, lingvo ktp. Tamen, kiel ni scias ke tiaj paĝoj diras

la veron? Almenaŭ en la pasinteco oni sentis ke la Encyclopedia Britannica estas preskaŭ 'oficiala' fonto. Nun oni serĉas vorton kaj aperas miloj da paĝoj – kiu estas la plej bona?

Ĉe laboro, moderna teknologio helpas nin pli bone labori. Oni povas verki raporton rapide per komputilo. Antaŭ jaroj, verki raporton per skribmaŝino estis tre daŭra afero. Tamen, moderna teknologio povas esti malbona. Ni ĉiuj konas kunlaborantojn kiuj pasigas la tutan tagon per Facebook aŭ sendas retmesaĝojn pri personaj aferoj.

Ĉu nova teknologio estas bona por Esperanto? Ni kredas ke jes. Esperanto temas pri komunikado inter personoj el diversaj landoj. En Aŭstralio kaj Nov-Zelando kie oni ne povas facile viziti najbaran neanglalingvan landon, Esperantistoj antaŭe devis korespondi per letero aŭ ŝpari multan monon dum multaj jaroj por eksterlanden vojaĝi. Nuntempe, nova Esperantisto povas preskaŭ tuj paroli Esperanton kun alilandulo per retmesaĝo, babilado, aŭ Skajpo. Serĉi la vorton 'Esperanto' en google.com donas pli ol 100 milionoj da rezultoj. Tio montras al nova lernanto de Esperanto ke nia lingvo funkcias. Rimedoj por lerni Esperanton facile troveblas senpage en la Interreto, ekzemple en lernu.net. Oni ne plu devas serĉi libron en librovendejo aŭ biblioteko, aŭ eĉ partopreni kurson aŭ kluban kunvenon. Tamen, kiel prelegis Humphrey Tonkin dum la kongreso en Adelajdo, tio povas havi malvantaĝon: Esperantistoj ne plu devas aliĝi al klubo, asocio, aŭ revuo. Kun malpli da membroj, asocioj kiel UEA, AEA, aŭ NZEA malfacile funkcios. Ĉu tiaj asocioj daŭre havas lokon kiam Esperanto-parolantoj povas informiĝi, komuniki, kaj 'kunveni' per la reto?

Do, responde al la demando je la komenco de ĉi tiu artikolo, teknologio certe faciligas multajn aferojn. Je la sama tempo, tamen, komunikaj teknologiaĵoj kiuj supozeble povas helpi komunikadon eble malplibonigas interpersonan komunikadon.



Bildo: Du datenbastonetoj kaj unu radiofonia modemo. Vidate estas 5 cenda monero por montri komparon de grandeco de la modernaj aparatoj.

Vizito al Tasmanio

Jong Soo (Koreio)

Mi kaj mia edzino, Roza, dum tri monatoj vojaĝis tra Suda Aŭstralio kaj Tasmanio. Ni vizitis la Klubon de Melburno, Kafejan Klubon, Societon de Tasmanio, kaj Klubon de Adelajdo. Membroj bonkore akceptis nin kaj ni tranoktis ĉe esperantistaj domoj. Denove mi sendas mian dankesprimon al ili, kaj mi dankas aliajn kiuj ĉiĉeronis nin.

Antaŭ la vojaĝo, mi volis vidi nur laŭ vidpunkto de simpla vojaĝanto normalan vivon. Malgraŭ tio, ni serĉis Esperantistojn por renkonti. En Lilydale en Tasmanio ni renkontis Johanon kun kiu ni restis du semajnojn. Dum nia restado ni interparolis kun li en Esperanto ĉiutage ne nur pri ekologia vivo sed ankaŭ pri aliaj agrikulturaj metodoj kaj eĉ vegetarana vivo.

Ni vizitis Hobarton kie ni renkontis grupon de Esperantistoj kiuj regule kunsidas ĉe la Universitato de Tasmanio. Mi prelegis pri la paca movado en Koreio kaj montris multajn fotojn, kiel por solidariĝi per Esperanto kaj kunlabori kun aliaj grupoj.

Iun tagon, Kam Lee veturigis min al la historia urbo Richmond, kiu estas je 25 km nordoriente de Hobarto. Dum la fruaj jaroj de la 19-a jarcento, la urbo estis tre prospera kaj ĝi situis sur la ĉefvojo inter Hobarto kaj la marhaveno de Arturo. Ni piediris trans la faman Richmond-ponton, kiu estas konstruita en 1823 kaj estas nuntempe la plej malnova ankoraŭ uzata ponto en Aŭstralio.

Kelkajn tagojn poste ni veturis aŭtomobile al la supro de Monto Wellington. La vento estis tre forta kaj malvarmega. Ne estis multa neĝo ĉirkaŭe, sed neĝo estis videbla sur kelkaj montoj en la okcidento. Ni eniris la rigardejan konstruaĵon, kaj ni povis vidi Hobarton, Riveron



Bildo 1: *Ponto de Richmond: Trankvila, kvazaŭ la tempo haltis.*

Derwent, kaj parton de la suda marbordo. Interesa vido je la supro estis avertsignoj, kiuj avertis aŭtomobilveturistojn pri la ebla nefunkciado de telekomandiloj, pro la fortaj radiaj ondoj dissenditaj de la apudaj teledissendaj turoj. La telekomandilo de Kam por malŝlosi la aŭtomobilajn pordojn kaj kofron ne funkiciis; tial li devis mane uzi la ŝlosilon aŭ rekte premi butonon. Ni iris malsupren al la komenco de la vojo de la monto. Ni piediris al loko, kie la monto povas esti uzata kiel pejzaĝafono. Bonŝance, piediranto preterpasis kaj li povis foti nin. Li koincide deziris iri al la urbocento kaj estis sufiĉa spaco en nia aŭtomobilo.

Lia kampadaŭto estis riparata, sed la atendtempo por anstataŭa peco estis almenaŭ du monatoj. Dum monato, li loĝis en la montetoj apud Monto Wellington. Kia kuraĝa homo, ĉu ne! De tempo al tempo li duŝis ĉe eminenta jaktklubejo. Mi scivolas kiom da jaktmembroj rimarkis tion?!

La internacia futbalkonkurso okazis en Sudafriko samtempe kiel nia vizito. Iun vespermanĝon kun la Hobarta Esperanta Klubo mi diskutis pri la rezultoj kaj eblaj rezultoj de venontaj ludoj kun Kam. Aŭstralio ricevis du ruĝajn kartojn dum la unuaj du ludoj. Kam ŝerce demandis ĉu Aŭstralio gajnos pli multajn ruĝajn kartojn ol poentojn! Bonŝance por li, Aŭstralio gajnis pli multe da poentoj sed, pro poentdiferenco, Ganio kaj ne Aŭstralio progresis al la sekva parto de la konkurso. Koreio travivis similan sorton. Mi supozas ke ĝi estas nur ludo!?

Memevidente estas ke ne-angladenaskaj aŭstralianoj opinias ke la angla estas internacia lingvo. Tiaj homoj opinias ke Esperanto estas praktike neutila lingvo, kaj ne necesas lerni internacian komunan lingvon. Mi opinias ke propagando pri Esperanto estas pli malfacila en Aŭstralio ol en aliaj landoj.



Bildo 2: *Renkontiĝo de la Hobarta Esperanta grupo dum vespermanĝo. Maldekstre al dekstre: Jong kaj Roza (starante), Andrew, Kathy, Robert, kaj Shae (sidante).*

Hieraŭ

Terry Manley

Esperantistoj el NovSudKimrujo prezentis la sekvan teatraĵon dum Aŭstralia Jubilea Esperanto-Kongreso en Adelajdo. Verkis la teatraĵon Terry Manley kaj la temo aludas al la prelego pri George Collingridge dum la Adelajda Kongreso. Laŭ George, la Portugaloj estis la unuaj Eŭropanoj kiuj vizitis Aŭstralion en ĉirkaŭ 1522.

La teatraĵo estas farso en kiu kvin eŭropaj landoj sinsekve alvenas por imperiisme alpreni la landon, Aŭstralion, sen agnosko al la loĝanta popolo indiĝena. La sceno degeneras al sportludo inter la nacioj. Ĉiuj strebas gajni la terglobon. La nura saĝa komento estas de indiĝeno kiu rigardas al la invadantoj kiel frenezuloj kiuj alvenis al la lando 'hieraŭ' kaj 'jam deziras krei prarakontojn'.

Roluloj:
Indiĝenaj patro kaj filo
Indonezia maristo
Ĉina maristo
Mendonca (portugala ŝipestro)
Torres (hispana ŝipestro)
Tasman (nederlanda ŝipestro)
LaPeruse (franca ŝipestro)
Cook (angla ŝipestro)

Sceno Unu: Sur plaĝo
Sidas surgrunde du indiĝenoj apud fajro manĝante ostrojn.
Envenas portugala maristo kun standardo kaj starigis ĝin en la grundon. Indiĝenoj rigardas unu la alian kaj gratas la kapon.

Mendonca: *Je la nomo de Reĝo Manuel mi proprigas ĉi tiun landon kiel regnon de Portugalujo.*
Eliras portugalo kaj je la alia flanko envenas hispana maristo kun hispana standardo. Li rigardas la standardon de Portugalujo kaj iom flankenmetas ĝin, starigante la hispanan apude. Ree la indiĝenoj rigardas ridete.

Torres: *Por la Reĝo Filipo la tria kaj la sankta papo, Hispanujo rajtas ricevi la duonon de ĉi tiu lando, laŭ traktado inter Hispanujo kaj Portugalujo kiuj, benitaj de Dio, disdividis la tutan mondon inter si.*
Eliras hispano kaj je la alia flanko envenas nederlanda maristo kun nederlanda standardo. Li rigardas la standardojn de Portugalujo kaj Hispanujo. Flankenĵetante ilin, li starigas la nederlandan anstataŭe. La indiĝenoj rigardas pli okulume.

Tasman: *Nome de la Nederlanda Orienta Komerca Kompanio mi alproprigas ĉi tiun landon kaj ĝian enhavon por komerce gajni.*
Eliras nederlandano kaj je la alia flanko envenas maristo kun franca standardo. Li rigardas la standardon de Nederlando. Flankenĵetante ĝin, li starigas la francan anstataŭe. La indiĝenoj rigardas rideme.

LaPeruse: *Nome de Francujo kaj la reĝo mi gajnigas al ni ĉi tiun landon.*
Eliras franco kaj je la alia flanko envenas angla maristo kun angla standardo. Li rigardas la standardon de Francujo. Flankenĵetante ĝin, li starigas la anglan anstataŭe. La indiĝenoj ne atentas.

Cook: *Por la Reĝa Moŝto de Anglujo kaj la brita imperio mi prenas ĉi tiun landon por koloniigi ĝin.*
La angla maristo eliras. La indiĝenoj stariĝas kaj iras al la standardo. Kontrolante la stangon kaj stangopinton, la patro manumas ĝin kiel lanco. Ili kolektas la aliajn kaj foriras el la scenejo.

Sceno Du: Ie en arbaro.
Envenas Ŝipestro Cook.

Cook: *Greetings. Ĉiuj scias ke estas ni, la angloj, kiuj vere esploris Aŭstralion unue. Mi velvojaĝis norden laŭ miloj da mejloj, zorge desegnante la marbordon kaj studante la landon antaŭ longa tempo.* Mezfraze envenas LaPeruse.

LaPeruse: *Bonjour. Ĉu vi forgesis ke samtempe ni, la francoj, estis en la regiono? Kial oni trovas nomojn kiel kabo Raoul, markolo D'Entrecasteaux, duoninsulo Freycinet kaj ……LaPeruse* (indikante sin mem fiere, kaj dume envenas Tasman).

Cook: *Malmultajn…malmultajn nomojn…*

Tasman: *Ha! Vi malfruuloj certe mistrafis la boaton. Ni la nederlandanoj multe esploris ĉi tie antaŭ ol viaj praavoj naskiĝis. Kaj pri nomoj vi ne menciis Tasmanion!* (li montras sin mem) *Jes, ĉirkaŭ Aŭstralio mi vojaĝis kaj ni esploris ankaŭ multe sur la bordo de okcidenta Aŭstralio.*

Cook kaj LaPeruse: *Ho! Hazarde. Hazarde.*

Cook: *Vi preskaŭ tute evitis la marbordon! Kaj ne senkiale post la ekfrapoj sur rokojn de multaj el viaj mallertaj maristoj survoje al la spic-insularo. Hazarda trovo, ne science bazita kiel nia malkovro, la vere unua.*

Tasman: *Ĉu!? Vi ne venis esplori sed por stelrigardi kaj trovi rubujon por viaj multaj krimuloj. Vi estis la ulo kiu hazarde retrovis landon kiun mi jam trovis. Kaj ne forgesu mian samlandanon Janzoon, kiu esploris en la nordo, vere unuan trovanton de la lando je la komenco de la deksepa jarcento.* Torres envenis dum la antaŭa frazo de Tasman.

Torres: *Momento! Momento! Li, Janzoon, kredis ke li trovis etendon de NovGvineo, ne novan landon! Kaj estas ni la hispanoj kiuj esploris la tutan Pacifikan Oceanon, inkluzive NovGvineon. Kaj kiu trovis la sudan vojon inter NovGvineo kaj Aŭstralio? Kial oni nomas ĝin la markolo de Torres?* (indikante sian bruston fiere elpumpitan).

Aliaj maristoj kune: *Fuŝ! Fuŝ! Fuŝ!*

Tasman: *Fuŝ! La polinezianoj antaŭis vin en tiu esploro, dise irante tra la insuloj en*



boatetoj. Vi eĉ ne vidis Aŭstralion, forbaritan de danĝera rifego. Kiel vi povas fieri pri tio?

Torres: *Sed ni estis multaj: Quiros, Mendana, Saavedra, Urdanta. Trans tiun Oceanegon, ne tian etan Hindan maron. Kaj eĉ se multaj el la ŝiparoj perdiĝis, verŝajne almenaŭ unu aŭ du vizitis Aŭstralion antaŭ ol malaperi.*

Cook: *Sub la fundo de la maro estas tiuj landamantoj.*

Torres: *Ne forgesu nian kamaradon Magellan, kiu la unua cirkaŭiris la mondon velvojaĝante.*
Mendonca eniris dum tiu parolo.

Mendonca: *Magellan! Ĉu vi deziras meritigi Hispanujon per la agado de Portugalujo? Kia aro de nesciantaj azenoj! Se vi iam legus historion vi ja scius ke Portugaloj unue esploris la mondon per velŝipoj. Diaz, da Gama, kaj multe aliaj inkluzive de Columbus forvojaĝis el la haveno de Lisbon, nia ĉefurbo, por trovi novajn landojn. Kaj dum preskaŭ la tuta deksesa jarcento, jes la deksesa, pli ol ducent jarojn antaŭ la vizito de Cook, ni iradis laŭ la komerca vojo suden de Afriko al Hindujo, Malako, Nov-Gvineo, Timoro. Ĉu vi vere kredas ke ni ne atingis Aŭstralion?*

Ĉiuj aliaj: *Ho! Ferakontoj! Mitoj!*

Tasman: *Vi ne rajtas ŝanĝi historion. Kie estas la atesto ke vi iam ajn estis ĉi tie?*

Ĉiuj aliaj: *Jes, ja kie?*

Mendonca: *Ĉu vi ne rimarkis tiujn ŝpurojn? Kanonojn, retpezilon, kaskedon, eĉ ŝipon, trovitajn en diversaj lokoj de ĉi tiu lando? Kaj tiujn mapojn kopiitajn en Francujo, de originalaj mapoj niaj.* (rigardante LaPeruse kaj svingante la pugnon tiudirekte) *Forŝtelistoj!*

Torres: *Jes, piratoj ja estas tiuj francoj kaj angloj.*

LaPeruse: *Forŝtelis! Nia samlandano deGonneville estis pli frua vizitanto ol vi.*

Mendonca: *Nu, ĉu vere? Gigantoj kaj hometoj, certe materialo por fantaziaj ferakontoj. Estas certe ke la fonto de la mapoj de Dieppe estas portugala kaj nenia alia.*

Indonezia maristo: *Vi hontindaj Eŭropanoj, venante al ĉi tiu Aŭstralazio, entrudante, profitante kaj strebante*



forŝteli eĉ la meriton por eltrovo de Aŭstralio. Estis ni el Indonezio kiuj komence gvidis vin ĉi tien. Krom lando estis nia scio, kiun vi forŝtelis. Bedaŭrindaj popoloj.

Eŭropanoj: *Ĉu en tiaj malgrandj boatetoj? Kiel ridinde!*

Indonezia maristo: *Ha. Viaj grandaj velŝipoj maltaŭgas, kiel atestas la multaj perditaj sur eviteblaj rokoj kaj rifoj. Ni venadis por pace komerci kaj kolekti tripangon, traktante la lokanojn afable.*

Ĉina maristo: *Sed kiu instruis vin fari tion, kaj al kiu vi vendis tiun afrodiziaĵon? Ni. Ĉar estis ni kiuj kuraĝe vojaĝis multajn jarojn antaŭ ĉiuj el vi.*

Aliaj: *Sensensaĵo!*

Mendonca kaj Torres: (Mendonca tenas terglobon sub la brako) *Estas ni kiuj havas rajton kiel la unuaj Eŭropananoj al la insulkontineno Aŭstralia.* (Montras ĝin sur la terglobo)

Tasman: *Vi! Ve! Ne! Vi duonigis la mondon kiel kukon por formanĝi!* (Ŝajnigas fari tion al la terglobo per glavo kaj ekkapti ĝin de Mendonca kiu ĵetas ĝin al Torres)

Torres: *Kaj kiu bakis ĉi tiun kukon?* (Levas la terglobon) *Dio! Kiu sinsekve donis ĝin al la veraj kredantoj.*

Cook: *Estas nia.* (Ekkaptas la terglobon)

LaPeruse: (Kaptante la globon de malantaŭe) *Ne, estas nia.*

Ĉiuj kvereladas: *Ŝtelisto! Perfidulo! Senrajtulo! Estas la mia! Donu ĝin al mi!* (Dume ĉiuj strebas gajni la terglobon kiel en korbopilka ludo)
Ĉina kaj indonezia maristoj forlasas la scenejon, ne dezirante konkursi. Vagas malrapide sur la scenejo la du indiĝenoj kun standardstangoj sur la ŝultroj. La aliaj senmoviĝas kaj silentas unu post la alia, montrante la indiĝenojn al apudulo.

Infana indiĝeno: *Pri kio temas tia ludo, Paĉjo?*

Paĉjo: *Ah filĉjo. Jen beboj, beboj. Freneza konkursa kulturo! Ili venis hieraŭ kaj jam deziras krei prarakontojn!*

FINO



JUBILEA GRUPFOTO ANTAŬ LA MITCHELL KONSTRUAĴO, UNIVERSITATO DE ADELAJDO

Ŝandor Horvath kaj Kam Lee

La Jubilea grupfoto okazis la 11-an de julio, 2011 antaŭ la Mitchell Konstruaĵo. Cent jarojn antaŭe, la unuaj kongresanoj estis fotitaj ĉe la sama loko. Kelkaj partoprenantoj de la nuna kongreso survestis vestaĵojn de la frua dudeka jarcento, kiel parto de la datrevena celebro.

La fotado igis min pensi pri la historia evento kaj medite rigardi je la pasinteco kaj estonteco. Kiuj el la unuaj kongresanoj opinius, ke Esperanto supervivos cent jarojn poste? Kiel Esperanto progresos en Aŭstralio kaj la mondo en la venonta centjaro?

Dum la komenco de la grupfota evento, Roger Springer afable ludis la sakŝalmon kaj gvidis la amason al la fotloko. La Mitchell Konstruaĵo estis konstruita en proksimume 1879 kaj estis unu el la originalaj konstruaĵoj de la Universitato de Adelajdo, kiu estis fondita en 1874.

Malantaŭa vico: JoMo (Jean-Marc Leclerq), Ashley Campbell, Max Wearing, Trevor Steele, Roger Springer, Paul Desailly, Alan Turvey.

Kvara vico: Kiril Lushnikov, Dimitri Lushnikov, Alan Bishop, Gerry Phelan, Libby Mortimer, Patricia Palmer, Mary Mills, Suzanne Corry, Marumi Smith, David Ryan.

Tria vico: Mae Springer, Bob Felby, Natalia Lushnikov, Lize Zhang, Dianne Lukes, Annie Gleeseon, Sandra O'Connor, Eileen Jones, Helen Palmer, Humphrey Tonkin, Jennifer Birchall, Ŝandor Horvath, Kevin Warburton, John Calder, Jamal Mazraeh.

Dua vico: Katja Steele, Audrey Felby, Katerina Taggart, Lucia Mary Berthelin, Paul Green, Margaret Furness, Beth Wearing, Hazel Green, Shirley Gradusov, Gloria Bristow, Nancy Roy, Prof. Nick Harvey, Carol Lutz, Jennifer Bishop, Terry Manley, Shrestha Kishor, Miranda Lutz.

Unua vico: Indrani Beharry-Lal, Kam Lee, Eddy Desailly, Polina Lushnikov.



CENTJARA ESPERANTA KONGRESO



ADELAJDO, 11a de JULIO, 2011

La bildoj montras kongresanojn en vestoj de antaŭ 100 jaroj, kiel vestis ĉeestantoj de la unua kongreso de Esperanto en Aŭstralio.

Kutime tre grandaj estis virinaj ĉapeloj, kies randoj estis larĝaj. La virinaj jupoj etendiĝis malsupren al la maleolo aŭ pli malaltaj.

La viroj ofte portis kompleton, kiu konsistas el salonjako, talio-jako, kaj pantalonoj. Ili uzis kravatojn kaj bantokravatojn.





Fama Esperantisto de NovSudKimrujo: George Collingridge

Prelego de Terry Manley dum la Aŭstralia Jubilea Esperanto-Kongreso en Adelajdo.

George Collingridge (1847-1931) estis la sola reprezentanto de NovSudKimrujo dum la unua AEA-a kongreso en Adelajdo en 1911. Kiel samŝtatano, mi decidis paroli pri li.

Antaŭ jaro mi iris al naskiĝdatrevena festo de malnova amiko mia kun kiu mi ofte ludis kiel infano. Survoje tien mi preterpasis mian infanaĝan loĝlokon, la loĝlokon de tiu amiko, nian lernejon kaj preĝejon. Reveninte hejmen, mi komencis esplori pri la vivo de pioniro de Esperanto, George Collingridge, kaj tiel informiĝis ke George edziĝis en tiu preĝejo de mia infaneco, Villa Maria, al kiu mi piediris kun la klaso semajnon post semajno por konfesi, preĝi, kaj partopreni diservon.

George naskiĝis en Anglujo en 1847, sed je la aĝo de 6 jaroj li translokiĝis kun sia familio al Francujo, kie li plenkreskiĝis kaj edukiĝis. En Francujo li studis arkitekturon, lignogravuradon, kaj arton. Dank'al bonaj instruistoj kiel Voillet-le-Duc, Carot, kaj Chareu li bone progresis. Interrompis lian studon la batalo de Mentana. Garibaldi regis armeon por venki la Papan ŝtaton. Kiel bonaj katolikoj (la familiaj prauloj estis katolikaj de la Midlands-regiono ekde almenaŭ 1430 kaj la familia emblemo estis la lilifloro (fleur de lys)). Georgo kaj sia pli aĝa frato, Alfred, aliĝis al la papaj 'Zuoaves' por defendi la ŝtaton. George batalis en 17 bataloj inkluzive en la fina batalo de Mentana. Li ricevis tri medalojn pro sia militservo, unu el tiu 'La Mentana Kruco'. Alfred mortis pro vundo.

Post tiu milita servo, George vojaĝis dum 1869-70 tra Italujo kaj Francujo. Kiam li revenis al Parizo la prusoj invadis Francujon kaj li kaj sia familio eskapis al Anglujo. Tie George faris lignogravuraĵojn por la famaj gazetoj, *The Illustrated London News* kaj *The Graphic*. Bildoj en ĵurnaloj, gazetoj, kaj libroj en 1870 estis presitaj per lignogravuraĵo. La fotoaparato ne ankoraŭ regis tiun arton. George komentis ke, kiel soldato en la armeo, li ricevis po 2 ½d. (2.5 cendojn) tage sed povis enspezi po £10 ($20) semajne por gravuri – bona enspezo. En 1872 li reiris al Parizo kie li gajnis laboron kun *L'Illustration* kaj *Le Monde Ilustré*. *Le Monde Ilustré* sendis Vierge, faman artiston, al Hispanujo por pentri

Bildo: *Terry Manley prelegas dum la Adelajda Kongreso.*



la edziĝon de Alfonso XII. Kun Vierge iris “tri el la plej bonaj gravuristoj eltroveblaj”, el kiuj unu estis George. En 1879 George travojaĝis Anglujon pentrante kaj enbanante la lagojn de Skotlando.

Pro politikaj cirkonstancoj en Francujo kaj ligoj familiaj en Aŭstralio, George decidis migri tien. Lia pli juna frato Arthur jam loĝis tie kaj laboris kiel artisto. La plej aĝa frato, Charles, estis pastro kiu militservis kiel pastro por la NSKa armeo en Sudano en 1885. Arthur pentris grandan olean pentraĵon de la armea foriro al Sudano, kaj tiu pentraĵo pendas en la Aŭstralia Milita Muzeo.

George jam havis laboron por *The Illustrated Sydney News* kiam li atingis Sidnejon en 1879. En la sama jaro li gajnis la unuan premion por lignogravurado de la Sidneja Internacia Ekspozicio. Kun Arthur li fondis la Artan Socion de NSK kiu anstataŭigis la Akademion de Arto. Arthur kaj George pentris kaj gravuris bildojn de Bathurst, Jenola-Kavernoj, kaj la pejzaĝo de la Hawksberry-Rivero. Ili eldonis tri ekzemplerojn de *Australian Art* en 1888.

Kaj Arthur kaj George instruis arton ĉe privataj lernejoj kaj teknikaj kolegioj. George eldonis la libron *Form and Colour* en ĉirkaŭ 1900. Tiu evoluo farendis pro la malaltiĝo de enspezo rilate gazetbildojn laŭ la rimedo de lignogravuro. Inter 1880 kaj 1893 la enspezo iĝis dekono (po £1 por kvadrata colo ĝis 2/-) kaj inter 1893 kaj 1900 ĝi malpliiĝis pluan kvaronon ĝis povra 6d. por la sama kvanto. La fotoaparato anstataŭigis la lignogravuron.

En 1882 George edziĝis kun Lucy Makinson kaj loĝis en Berowra. Ili havis ses infanojn, du filinojn kaj kvar filojn. Pro la fakto ke ne estis trajnoj al Hornsby tiutempe, George veturis al Sidnejo per kaleŝo kaj remis boaton kvin mejlojn al sia hejmo en Berowra. Estas loko tie kiu nomiĝas Collingridge-Terpinto. En Hornsby li havis artejon. La nomo de lia hejmo en Hornsby estis “Jave-la-Grande”.

En 1883 George ricevis peton de publika biblioteko en Sidnejo kaj tio metis lin sur la vojo por pristudi geografion kaj kartografion. La Sidneja biblioteko, kun tiuj de Melburno kaj Adelajdo, aĉetis kopiojn de mapoj faritaj en Dieppe, Francujo, inter 1536 kaj 1566. George estis konata de la Sidneja biblioteko kiel lingvisto ĉar li scipovis ses lingvojn (poste sep kiam li lernis Esperanton). Tial, la biblioteko petis lin traduki la mapojn. De tiu studo kaj dokumentoj jam studitaj en Italujo, George konvinkiĝis ke la unuaj Eŭropanoj al Aŭstralio estis Portugaloj. En 1895 li eldonis libron *Discovery of Australia*. Kiel bona lignogravuristo, li faris la mapojn kaj bildojn por tiu libro. Li tiom konvinkiĝis ke li verkis artikolojn por gazetoj dum multaj jaroj pri tiu temo. Kaj ne ĉiam sukcese. Foje liaj esplor-rezultoj estis kontraŭitaj de profesiuloj en tiu kampo. Kaj liaj argumentoj ŝajnis ne laŭfaktaj sed iom opiniemaj. Post kritiko de Nederlanda klerulo pri artikolo en Londona *Geographical Journal*, George ne multe sendis

artikolojn al Eŭropo. Lia traktado de aspekto de mapoj estis artisma, vidante birdojn kaj leonojn en iuj landformoj kaj interpretante nomojn sammaniere. Kompreneble, tiu nepreciza interpreto ne plaĉis al tiuj kiuj deziris serioze studi kartografion. Kvankam George sufiĉe bone prezentis kialojn por kredi ke Portugaloj estis la unuaj Eŭropanoj al Aŭstralio, ne helpis tion ke li malagnoskis la esploron faritan de Nederlandanoj. Ĉu pro la kritiko de Kramp, Nederlandana klerulo, aŭ pro la senagnoskata uzo de liaj mapoj faritaj de Nederlandano, ni ne scias. Li ja ricevis honoraĵojn de kaj Portugalujo (Portugala Ordeno de Santiago 1908) kaj Hispanujo (Hispana Ordeno de Isabela la Catolica 1917); tial, li emis subteni tiujn rilate al esploro. Tamen, laŭ lia studo, tiu subteno estis ĝusta.

En 1908 li fondis la Esperanto-Klubon de Gosford, la unuan en NSK. Li loĝis en Narara apud Gosford inter 1911 (kiam li estis 64-jara) kaj 1914. Dum la kongreso de AEA en Adelajdo en 1911, George prelegis pri arta 'Formo kaj Koloro'.

Poste li revenis al Hornsby. En ĉirkaŭ 1920 Arnold Wood, Profesoro de Historio ĉe la Universitato de Sidnejo, petis al George uzon de liaj mapoj en prelego. George konsentis sed estis iom konsternita kiam la prelego de Wood prezentis kontraŭan opinion, etigante tiun de Collingridge. Je tiu tempo li estis 74-jara kaj ne tiom batalis por konvinki aliajn pri sia teorio. Dum lia emeritiĝo, en la 1920aj jaroj, George verkis kelkajn libretojn. Li uzis vortludojn en tiuj verkoj kaj almenaŭ du havis titolojn tiajn: *Alice in One Dear Land* en 1922 kaj *Through a Joke in Class* en 1923 (kun pardonpetoj al Lewis Caroll). *IT* estis kolekto de lignogravuraĵoj en 1924, *Pacifika: The Antediluvian World* en 1928-30 revenis al la temo de geografio kaj historio kun teorio pri lando en la orienta pacifiko kiu subakviĝis lasante ŝpurojn en la civilizacioj de Paska Insulo, Sud-ameriko, kaj en la polinezianoj. *Round and Round the World* en 1925-33 estis la lasta de liaj libretoj.

Kiel mi menciis en la komenco de la parolo, mi ĉirkaŭiris lokojn de mia knabeco antaŭ unu jaro. Reveninte al tiu loko antaŭ ses monatoj, mi trovis la tombon de George. George mortis en 1931 kaj entombiĝis en la tombejo Field of Mars. Mi loĝis tuj ekster la tombejo dum multaj jaroj. Kun la genevoj mi ĉirkaŭiris la tombejon bicikle. Unu el niaj plej ŝatataj lokoj estis rondiro meze de la katolika parto. Tie mi trovis la tombon de George.



Celebrante 100 jarojn de Esperantaj kongresoj en Aŭstralio.

Ideoj por la venontaj 100 jaroj

Ŝandor Horvath

Dum nia jubilea kongreso en Adelajdo, eta grupo kolektis ideojn por la venontaj 100 jaroj da Esperanto-agado en Aŭstralio. Jen kelkaj el tiuj ideoj, kaj fantaziaj kaj praktikaj.

1) Trovu parencojn de tiuj kiuj lernis Esperanton en la pasinteco, kaj eble ili interesiĝos.

2) La estonteco verŝajne estos grandparte virtuala, do eble fizikaj monumentoj gajnos atenton. Granda piramido en Sidnejo eble helpus en ĝenerala kampanjo por altigi konscion pri Esperanto.

3) Niaj nombroj en la Interreto estas malgrandaj, kompare kun aliaj aferoj. Multe pli da homoj spektas filmojn pri katoj kiuj faras ion strangan.

4) Ni bezonas “infektumi”, tio estas rapide sendi mesaĝojn kaj novaĵojn al multaj aliaj homoj, kiel infekto. Kiel? Ni studu YouTube por vidi kio estas furora.

5) Ni bezonas nian propran konstruaĵon por bona organizo kaj aranĝoj. Eble faru Esperanto-Domon la plej alta konstruaĵo en la mondo?

6) Zorgu pri la posta kontakto kun homoj kiuj ĉeestis somerkursarojn.

7) Por allogi junulojn lasu afiŝojn en ĉiu junulara gastejo.

8) Ni povos havi moviĝantan kongreson aŭ kursaron – la homoj vojaĝu de unu junulara gastejo al gastejo en la sekva urbo kaj al la sekva ktp. Interesa agado gajnus pli da homoj (liberaj por vojaĝo) en ĉiu loko.

9) Ni povos inviti eksterlandajn esperantistojn (aparte kantistojn – JoMo avertiĝu!) por loĝi en junularaj gastejoj kaj logi aliajn loĝantojn al niaj esperantaj aranĝoj. Ni mem povos loĝi en junularaj gastejoj en aliaj landoj kaj logi aliajn loĝantojn al lokaj Esperantaj aranĝoj.

10) Ĉiu esperantisto apartenu al diversaj grupoj ekster Esperantujo. Ni parolu pri Esperanto al tiuj kiuj konas nin.

11) Havigu okazojn kie ni povos inviti aliajn homojn kiuj (ankoraŭ) ne estas esperantistoj.

12) Uzu la retejon meetup.com por allogi retumulojn al fizikaj kunvenoj.

13) Ni kuraĝigu tiujn kies personeco bone allogas homojn al la movado. Klonu tiujn kiuj havas la plej bonan personecon!

Ekspozicio pri Esperanto en la Migra muzeo de Adelajdo

Katja Steele

La 11-a de septembro 2011 estis por adelajdaj esperantistoj tago de ĝojo kaj fiero. En la ŝtata Migra Muzeo (82 Kintore Avenuo) estis oficiale lanĉita ekspozicio 'Esper--anto: antaŭenigo de ĉies lingvo', destinita al la ĝenerala publiko.

Estis antaŭ du jaroj kiam mi vizitis kun Trevor la Migran Muzeon. En la parto de la muzeo nomata The Forum estis prezentita unu el la etnaj grupoj vivantaj en Sud-Aŭstralio. Ĉu ni ne estas speciala homa grupo, kiu ankaŭ havas la rajton prezenti sin al la aliaj? Ni esploru la eblojn! Ni kontaktis la decidohavan kuratorinon de la muzeo - kaj ricevis ŝian jeson! Ŝi estis serioza: ni devis plenigi formularojn, doni nomojn kaj kontaktnumerojn de kvar Esperanto-respondeculoj, ni ricevis dosierujon kun multaj detaloj pri kiel organizi ekspozicion en la Migra Muzeo kaj kun dato 13-a de novembro 2009 venis letero kiu oficiale konfirmis al ni ke oni rezervas por ni la ekspoziciejon por septembro-novembro de 2011.

Ni elektis por la ekspozicio temojn, serĉis materialojn, formulis niajn direndaĵojn. Kio estas grava, kio kaptos la atenton de neesperantistoj? Necesas fari profesian laboron. Kiom kostas dezajnisto? Multe! Ŝandor alparolis la firmaon *Parallax*, ĉar tie laboras la juna Kellie, nevino de esperantisto Ashley Campbell. La firmao ĉiujare faras unu projekton senpage – kaj ĉi foje oni elektis la nian! Kellie estas ne nur talenta, sed ankaŭ ege pacienca. Pluraj konsultiĝoj, kontroloj, ŝanĝoj, korektoj. Dume ankaŭ kelkaj kunsidoj kun la kuratorino.

Bildo 1: *La oficiala tranĉado de la rubando*



Intertempe mi flugis al Melburno por serĉi historiajn materialojn. Du tagoj en deponejo, kie estas stokitaj la postlasaĵoj de Ralph Harry kaj aliaj, malpakado de skatoloj, kribrado, restokado en polvo kaj ŝvito. Sed juveletoj ja troviĝis. Certe multe pli estas en aliaj aŭstraliaj lokoj. Mi ekkores-pondis kun kelkaj esperantistoj, sed veraj materialoj venis nur de Betty kaj Henry Broadbent. Ho, kiom mankas al ni Esperanto-arĥivo!

Por julio estis planita nia jubilea kongreso. Multaj urĝaj taskoj. Sed ni sukcesis finaranĝi ankaŭ la pormuzeajn afiŝojn kaj en iom simpligita formo presigi ilin. La kongresanoj vidu ilin kaj komentu, plibonigu.

Kelkajn tagojn post la kongreso nia tripersona skipo rekaptis la organizan fadenon de la ekspozicio. Ni petis Ghil'ad Zuckermann, profesoron pri lingvistiko kaj gvidanton de la fako pri endanĝerigitaj lingvoj de la Universitato de Adelajdo, esti nia ĉefparolanto. Sed por la dato de la inaŭguro li havis aĉetitan flugbileton. Ni ŝanĝu la daton de la inaŭguro! Sed ĉu la grupo, ekspozicianta antaŭ ni, pretas fini kaj rapide forpaki siajn aĵojn? Jes, ĉio aranĝita.

Malfacilis elekti la montrotajn objektojn. La dezajnistino planis plenigi la grandan centran vitrinon nur per libroj, sed ni decidis enmeti ŝrankon en ĝin, en ĝin la E-librojn, ĉirkaŭ ĝin revuojn. Amiko pretis helpi transporti la 174-centimetrojn altan ŝrankon el nia propra laborĉambro. Pluvis, ventis, sed ni devis fari, ĉar la venontan tagon la enirstrato al la muzeo estos fermita pro vizito de la guberniestro. Skatoloj, skatoletoj kun libroj kaj aliaj eksponaĵoj ... Aĉeti ilojn por

Bildo 2: *Ĵus post la oficiala trancado de la rubando.*



alfiksi la afiŝojn, aĉeti la kafon, teon ktp. por la malfermo ...., ne forgesi pri la rubando, memorlibro.... Ŝandor faris du kopiojn de la nova filmo de Sam Green pri Esperanto; ĝi estos konstante montrata en la ekspozicieja televidilo. Iu prenu el la presejo la invitilojn, la flugfoliojn...kaj pagu. Por havi bonkvalitan registron pri la evento ni decidis mendi profesian filmiston.

La 11-an de septembro, dimanĉe posttagmeze, la alvenintoj kolektiĝis en la "kapelo" de la Migra Muzeo. La ceremonion gvidis Ŝandor Horvath. La ĉefan parolon havis profesoro Zuckermann, neesperantisto – en Esperanto! Paralele interpretis ĝin en la anglan Trevor Steele. Impone. Ankaŭ Kellie, la dezajnistino, diris kelkajn vortojn kaj ni dankis ŝin per floroj kaj libro-kupono. Inter la publiko sidis ŝia patro - iama esperantisto. Nome de la Migra Muzeo bonvenigis la ĉeestantojn Elspeth Grant, la kuratorino de la



Bildo 4: *Bob Felby ludas la banĝon.*

muzeo. Ni ĉiuj kantis du esperantigitajn aŭstraliajn kantojn ("Lag' en suda Aŭstralio" kaj "Sudaŭstralio naskis min".) kun la akompano de la mandolin-banĝo, ludita de Bob Felby, kaj transiris la korton en la muzeon. La verdan rubandon antaŭ la ekspoziciejo solene tratranĉis prof. Zuckermann. La ekspozicio estis oficiale malfermita!

Eniris la alvenintoj, inter ili kelkaj studentoj de la Universitato de Adelajdo. Ili miris kaj scivolis. La

Bildo 3: *Je la enirejo de la Esperanto-Ekspozicio. Bonvole eniru!*



filmisto registris kelkajn intervjuojn, ni fotis kaj trinkante kafon interbabilis kaj kun la malnovaj E-amikoj kaj kun la unuafoje renkontitaj vizitantoj. La ekspozicio aspektas estetike, ĝi estas farita vere profesie.

Ĉar la muzeon ofte vizitas lernejaj grupoj, Ŝandor kaj Trevor preparis por ili laborfoliojn: kaj por lernantoj (kun demandoj) kaj por ilin akompanantaj instruistoj (kun la respondoj al la demandoj). Ĉe la enirejo estas forpreneblaj informiloj, eĉ informiloj pri la projekto Mondeto kaj ekzempleroj de ESK. La organizo History SA enmetas pri ni informon en sian bultenon.

La Esperanto-ekspozicio en la adelajda Migra Muzeo, verŝajne la unua de sia speco en Aŭstralio, estos vizitebla ĝis la 24-a de novembro 2011. Ni esperas ke ĝi bone servos al la informado pri Esperanto kaj ke ĝi poste montriĝos en pliaj aŭstraliaj urboj.

INTERVJUO DE KELLIE CAMPBELL-ILLINGWORTH

Ŝandor Horvath

La intervjuo de Ŝandor kun Kellie Campbell-Illingworth okazis ekster la antaŭejo de la Migra Muzeo. Kellie estas la dezajnisto de la Esperanto-Ekspozicio ĉe la Migra Muzeo. Ŝi menciis ke la farado de la projekto daŭris dum multaj monatoj kaj ŝi estas kontenta pri la aspekto kaj fino de la prezento.

Kellie diris ke la lingvo aspektas facile lernebla, malgraŭ ke nuntempe ŝia vortstoko estas tre malgranda. Antaŭ la komenco de la projekto, ŝiaj Esperantaj travivaĵoj inkluzivis sian patron, kiu forte interesiĝas pri Esperantaj kulturo kaj historio. Li ankoraŭ dum mallonga tempo instruis Esperanton en elementa lernejo.



Bildo 5: *Maldekstre: Ŝandor Horvath, dekstre: Kellie Campbell-Illingworth.*

Vizito al Kakatua-Insulo

Kam Lee

Kakatua-Insulo estas malgranda insulo kun areo de 18 hektaroj en la Parramatta-Rivero je 10 km okcidente de la Sidneja urbocento. Mi hazarde malkovris la insulon dum mi veturis prame laŭ la Parramatta-Rivero. Ĉi tiu artikolo temas pri miaj du vizitoj al la insulo kun Esperantistoj.

La unua ekskurso komenĉigis ĉe Circular Quay en Sidnejo kie mi renkontis kelkajn Esperantistojn kaj amikojn. La kontraŭ-riverflua veturo daŭris proksimume 40 minutojn laŭ la Parramatta-Rivero kaj la pramo devis pasi sub la ponto de la Sidneja haveno. Ni elŝipiĝis kaj komencis piediri laŭ la insula kajo. Niaj unuaj pensoj estis ke ni estas en loko de antaŭa epoko. Estas nur ekde 2007 ke la insulo estas vizitebla por la ĝenerala publiko.

Kakatua-Insulo antaŭ 1788 estis loko kie multaj ruĝlignaj eŭkaliptoj kreskis kaj ĝi estis ofte vizitata de sulfurtufaj kakatuoj. Dum 1839-1850 la insulo estis malliberejo por homoj el Norfolk-Insulo. Poste, malliberuloj el aliaj lokoj venis kaj la nombro de malliberuloj plimultiĝis al 500. En 1869 la malliberejo estis fermita pro malbonaj vivkondiĉoj. Dum 1870-1880, la insulo estis industria lernejo kaj reformejo por knabinoj.

Post 1900, la insulo iĝis doko kaj dum 1913 la unua Aŭstralia ŝtala militŝipo estis konstruita sur la insulo.



Bildo 1: *Kirill (filo de Dimitri, maldekstre) kaj Dimitri (dekstre) sur pramo, kiu veturas laŭ la Parramatta-Rivero al Kakatua-Insulo. En la fono estas la ikona ponto de la Sidneja haveno.*

Inter 1930-1945, la insulo estis ĉefa ŝipkonstrua loko kaj doko por la sudorienta pacifika regiono dum la dua mondmilito precipe post la kapto de Singapuro. Dum 1945-1965 okazis tie riparado de ŝipoj kaj renovigado de submaraj ŝipoj. Interese, amiko de mia Esperantista amiko, Roger Springer, antaŭe laboris sur la insulo kiel submarŝip-veldisto.

Kelkaj militŝipoj konstruitaj sur la insulo estas *Warramunga* (1942) kaj *Vampire* (1952). La laste konstruita ŝipo estis *Success* (1984). En 1992 la doko estis fermita kaj multaj el la konstruaĵoj estis malkonstruitaj.

La unua parto de nia ekskurso estis piediro laŭ la orienta parto de la insulo kaj ni eniris grandegan konstruaĵon, kiu aspektas kiel

grandega riparejo. La strukturo fakte estis ŝipfabriko kiu havis ondajn murojn, tegmenton, grandegajn pordojn, kaj mankis multaj fenestroj. Tre impona estis la grandega senobstrukcia spaco en la konstruaĵo. La plafono estis la tegmento, alta je proksimume 30 metroj. La longeco de la konstruaĵo estis eble 50 metroj kaj la larĝo de la fabriko estis eble 70 metroj, dividite de du barieroj.

Ni vidis grandegajn tornilojn, kiuj estis uzitaj por fari ŝipturbinojn kaj aliajn maŝinpartojn. Videblaj estis strangaj ilegoj, kies funkcio estas mistero. Tiaj industriaj ekipaĵoj de la deknaŭa jarcento povas esti misdeduktitaj kiel abstraktaj skulptaĵoj aŭ rekvizitoj en tre malnova sciencfikcia filmo.

Poste ni iris al la pordo de tunelo, kiu estas parto de sistemo de tuneloj kaj funkciis kiel bombŝirmejo dum la dua mondmilito. La tuneloj estis sufiĉe longaj kaj etendiĝas de unu flanko de la insula altebenaĵo al la kontraŭa flanko.

Bedaŭrinde, pluvis peze kaj ni devis ĉesi nian piediron. Ni hejmeniris iomete malkontentaj, sed ĉiuj estis Sidnejanoj kaj, tial, ili povas facile reviziti tiun interesan lokon.

Dum la nokto mi dormis en Esperanto-Domo kie okazis stranga koincido. Mi renkontis unu el la pentristoj kiuj laboras en la apuda ateliero kaj mi estis invitita eniri la pentristan ĉambron. Mi hazarde vidis pentraĵon de unu el la gruoj (*African Queen*) sur Kakatua-Insulo. La pentraĵo estis granda, tre impona,



Bildo 2: *Grace staras antaŭ unu el la multaj torniloj, kiuj estis uzitaj por fari ŝipturbinojn. La foto estis farita en la peza maŝinmetiejo.*

pentrita per akrila farbo kaj ĝi estis lastatempe vendita je $3500. Ŝajnas ke almenaŭ kelkaj pentristoj estas sukcesaj, ĉu ne?

La venontan tagon, la vetero estis bona kaj neantaŭvidite mi renkontis John Massam, Esperantiston el Okcidenta Aŭstralio. Ni decidis viziti Kakatua- Insulon!



Bildo 3: *Kam staras antaŭ unu el la strangaj maŝinoj en la ŝipfabriko. La funkcio de ĉi tiu maŝino estas nesciata, sed eble la du grandaj radoj estas ligitaj per zono. Ĝi aspektas iom sciencfikcia, ĉu ne?*

Kiel en la antaŭa tago, ni vizitis la ŝipfabrikon. Poste, ni iris al la okcidenta parto de la insulo. Tre vidinda estis la *African Queen*. Multajn jarojn antaŭe estis multaj gruoj kaj la plej granda havis la nomon *Titan*, kiu altis 20 etaĝojn kaj povis levi 150 tunojn kaj ĝis trajnojn. Ĉi tiu levmaŝino estis malkonstruita antaŭ multaj jaroj.

Sur la insulo ni vidis ke oni faras filmon, kiu uzis partojn de la ŝipfabriko kaj eksteran parton de la insulo kiel la fonon. Ni vidis du aktorojn, kiuj estis viro kaj knabo vestitaj en vestaĵoj de la frua deknaŭa jarcento. Kontraste, dum 2008 partoj de la tre sukcesaj sciencfikciaj filmoj "X-Men Origins" kaj "Wolverine" estis filmitaj en ĉi tiu loko.

Ni supreniris per ŝtuparo al la altebenaĵo en la mezo de la insulo. Multaj konstruaĵoj el la diversaj epokoj de la historio de Aŭstralio ekde la komenco de la frua Eŭropa koloniismo ĝis la industria epoko de la meza dudeka jarcento estis videblaj.



Bildo 4: *Kam side sur parto de la gardistejo. Videbla estas parto de la suda flanko de la insulo kaj la gruo African Queen. En la fono estas la urbocentro de Sidnejo. Malgraŭ la trankvila aspekto, la vento estis tre forta!*

Ni eniris ŝtonan gardistloĝejon. La kolonia konstruaĵo enhavis multajn mallarĝajn fenestrojn, kiuj estis uzitaj por pafi al entrudantoj. Proksime estis rigardejo, kaj la vidindaĵo estis mirinda. Oni povas klare vidi la ĝeneralan aspekton de unu flanko de la insulo. Ni observis kanalon, kiu estis antaŭe uzita por la riparo de ŝipoj. En la fono estis la urbego de Sidnejo.

La esplorado de la insulo finiĝis per piediro al la doko kaj renkontiĝo de pramo. La reveno al Sidnejo kaj la reveno al la nuna dudekunua jarcento samtempe okazis.



Bildo 5: *John sidas sur unu el la kvar identaj maŝinegoj kiuj staras en vico. Ilia funkcio estas nesciata, sed eble ili estas partoj de gruo.*

Kongreso de NZEA en Rotorua

La venonta kongreso de NZEA okazos en nova kongresejo en la urbcentro de Rotorua (proksime al Auckland) ekde la 28 ĝis la 30 de januaro 2012. José Antonio Vergara, elstara Esperantisto el Ĉilio, prelegos kaj gvidos lingvajn sesiojn. La kosto estas nur NZ$50 (senpage por infanoj kiuj aĝas 5-12 jarojn). Eksterlandanoj povas pagi surloke. Estas multaj hoteloj apud la urbcentro de Rotorua, sed ni sugestas ke vi rapide mendu. Por pliaj informoj kaj aliĝilo, vidu nian novaspektan retejon: www.esperanto.org.nz.

Fotoj: Lokoj en Rotorua (Ŝandor Monostori) kaj Katedrala Roko, Waimangu (laŭ afabla permeso de Destination Rotorua Marketing).


NZEA Congress in Rotorua

NZEA's next congress will take place in a new conference venue in central Rotorua (close to Auckland) on 28-30 January 2012. José Antonio Vergara, a well known Esperantist from Chile, will be our guest speaker and will lead language sessions. The cost is only NZ$50 (free for children aged 5-12), and overseas visitors can pay upon arrival. There are plenty of hotels around central Rotorua, but we suggest that you book as soon as possible. More information and an enrolment form are available from our new-look website: www.esperanto.org.nz.

Photos: Locations in Rotorua (Sandor Monostori) and Cathedral Rock, Waimangu (courtesy of Destination Rotorua Marketing).









New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

David Ryan | President
ryangomez@xtra.co.nz

Chris Krägeloh | Vice-President
chris.krageloh@gmail.com

Donald Rogers | Treasurer
dc1971@clear.net.nz

Bradley McDonald | Secretary
bradley.m@woosh.co.nz

Howard Gravatt | Assistant Secretary
hgravatt@ihug.co.nz

Erin McGifford | Committee Member
erinmcgifford@hotmail.com

Vicky Crickett | Committee Member
vcrickett@gmail.com

NZEA s vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, answering queries from the public about Esperanto, and organising the annual NZEA conference.

Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
www.oceana-esperanto.weebly.com
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Dianne Lukes | President
prezidanto@esperanto.org.au

Kam Lee | Administrative Director
admin@esperanto.org.au

Suzanne Corry | Financial Director
financoj@esperanto.org.au

Ian Green | Dir. of Member Services
servoj@esperanto.org.au

Richard Delamore | Dir. of Promotion
informado@esperanto.org.au

Jennifer Bishop | Director of Education
edukado@esperanto.org.au

Yaw Ampomah Badu | Dir. of Implementation
utiligado@esperanto.org.au

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



Jarfina FESTego kun Silvestra FESTeno 27-dec-2011 ĝis 2-jan-2012 en la franca Esperanto-kastelo Greziljono.

www.gresillon.org





